Joseph Düpjohann,

# Mia infana lingvo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kiel knabo paroladis
nur platdiĉe mi,
ĉar tiele instruinta
estis panjo min.

Inter la infanoj urbaj
sidis sole mi,
kiuj flue paroladis
la germanan ja.

Sed ne daŭris longan tempon,
ĝis komprenis mi,
ĝis mi povis legi tiun,
ankaŭ skribi ĝin.

Iris mi for el la dom'
kiel juna vir',
lernis fremdajn lingvojn mi
en la vasta mond'.

Nun volonte pensas mi
kiel maljunul'
pri la infanec' kaj pri l'
lingvo de l' patrin'.

Tiam mi platdiĉan preĝon
diras por mi mem,
memorante jenan tempon,
kaj ekploras mi.

. . .

Joseph Düpjohann,

# Miene Kinnerspraoke

Äs ik inne Schole quamm,
küerde ik bloß platt,
wildat miene leiwe Mamm'
so mi lähert dat.

Tüsken lutter Stätterkinner
satt ik blaie Wicht,
we könn' quatern aohne Hinner
haugdüütsk flaitend licht.

Aower nao 'ne kuorte Tiet
har ik et begriepen,
konn ik't akraot aohne Spiet
liäsen un auk schriewen.

Wu ik grötter wuorn sin,
häbb dat Huus verlaoten,
in de wiede Welt gaohn bün,
lährt ik frümde Spraoken.

Nu, in miene aollen Dage,
denk ik gärn t'rügg
an de fröhen Kinnerjaohre,
äs'k män plattdüütsk küert häff.

Dann sägg ik för mi ganß liese
en Gebätt in't aolle Platt,
wo is all de Tiet bloß bliewwen,
un de Oogen wät't mi natt.

. . .

*Traduko de la Basgermana poemo "Miene Kinnerspraoke" de* Joseph Düpjohann *(Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1930-10-18) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2003-04-16.*

*MR-415-1 / Arg-251-509 (2004-07-04 22:05:37)*

*Kun afabla permeso de l' aŭtoro, sinjoro Joseph Düpjohan (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio), prenita el la libro "Liäbensbeller" ("Vivobildoj"), kiu aperis en 1998 en la eldonejo E. Holterdorf, Ruggestr. 27 - 29, D-59302 Oelde, F. R. Germanio.*

*Verkinto de tiu ĉi Basgermana poemo estas* Joseph Düpjohann *(Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1930-10-18), publikigita 1998.*

*Arg-251-508 (2004-06-30 14:14:25)*

*Mit freundlicher Genehmigung des Verfassers, Herrn Joseph Düpjohann (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, B. R. Deutschland), entnommen aus dem Buch "Liäbensbeller", erschienen in 1998 im Verlag E. Holterdorf, Ruggestr. 27 - 29, D-59302 Oelde.*